



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 241

Majo, 2006

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

DUDEK JAROJ *INTER NI*

En sia libro ...*Kun siaspeca spico!* (1971), Raymond Schwartz skribis ironie pri la Esperanta gazetaro, „Ĝi estas pli saĝa. Kvankam... Nu, kial plue tion kaŝi? La Esperanta gazetaro suferas pro stranga epidemio: Akuta datrevenito (lat. *anniversaritis acuta*)... Kion fari kontraŭ tiu plago? Datreveno ne estas kiel ratdeveno. Pri ambaŭ oni ja konas la originan kaŭzon, sed oni povas malhelpi la konsekvencojn nur ĉe la dua. Helpe de ratveneno.”

Ni ne maltrankviliĝu pri tio. Je majo 1986, sub la gvidado kaj redaktado de Harry LEWIS, la loka grupeto en Halifaxo, Nov-Skotio, eldonis la unuan numeron de 3-paĝa gazeteto, kiun ni nomis *Inter Ni*. Laŭ la koncepto de Harry, la gazeteto provizu oportunon por grupanoj por praktiki skribadon, verkadon pri io ajn temo en la internacia lingvo. Post kelkaj jaroj, mi transprenis la rolon de redaktoro, kaj Gene KEYES anstataŭis min dum jaro kaj duono. La celoj iom ŝanĝiĝis tra la jaroj, kaj nun ni ne tiom multe traktas lecionojn pri gramatiko, sed multe pli celas informi kaj distri la legantaron. Kun la pasinta, 240-a numero, *Inter Ni* finis 20 jarojn de ĉiu-monata apero, kaj ĉi-monate ni rajtas festi la veran 20-jariĝon de nia modesta gazeteto.

Kial festi? Unue ni festu la daŭran ekziston de la gazeto. Jam estis jarfinoj, kiam mi dubis, ĉu nia gazeteto daŭrus. Kiel ni jam scias, estas aliaj revuoj (ekz. *Verda Teo* el Japanio), kiujn jaron post jaro aperigas lokaj grupanoj. Eble la nia indikas stagnan grupeton en kiu malmulto ŝanĝiĝas, sed mi preferas festi pliboniĝon en la kvalito de la artikoloj kaj, samtempe, pliboniĝon de la lingva scipovo de niaj kunlaborantoj kaj kunlegantoj.

Ni ankaŭ festu la daŭran partoprenon de niaj abonantoj kaj legantoj. Oni povas nur supozi ke vi, estimata leganto, ankaŭ kutime ŝatas la enhavon. Alie, vi indikus tion al mi, ĉu ne? Jam ekzistas en la interreto tro multe da materialo esperantlingva kaj interesoplena por povi ĉion legi kaj aŭdi kaj spekti. Mi supozas, ke la ricevo de ĉiumonata surpapera gazeteto kun belaj grafikaĵoj kutime plaĉas al vi, la leganto. Oni povas trankvile porti kaj legi ĝin kie ajn oni deziras.

Ni festu ankaŭ pro tio, ke nia eta grupo de kunlaborantoj kreas firman ligilon al pligrandiĝanta grupo de homoj ĉirkaŭ la mondo. Steĉjo NORVELL disdonas multajn ekzemplerojn al sia konatularo, kaj instigas ilin verki kontribuaĵojn. Tial la grupo "inter ni" troviĝas en eĉ pli diversaj foraj anguloj de la mondo, kaj ni povas ankaŭ dividi pli riĉan fonton da informo pri nia pligrandiĝanta komunumo. Eĉ se la aperritmo iom stumblas de tempo al tempo, la enhavo - se mi rajtas tion diri - kutime estas interesoplena.

Evidente la enhavo interesas min, la redaktoro, sed ĉu vi, la leganto, havas kritikojn aŭ ideojn por plibonigi nian gazeteton? Ĉu vi deziras partopreni en nia agado kaj daŭrigi nian interŝanĝon de ideoj, informoj kaj amuzaĵoj per kontribuaĵo? Mi multe esperas, ke vi partoprenos (ĉu denove, ĉu unuafoje) en la konversacio inter ni.

— Bob Williamson
Via redaktoro

Landoj De La Abonantoj/Kontribuantoj

Mondlokoj en Kiuĵ Loĝas Aŭtoroj de *Inter Ni*

Kanado	Alasko (Tlingit gento)
Hungario	Aŭstralio
Usono	Italio
Germanio	Francio
Rumanio (inklude Transilvanio)	Nov-Gvineo
Ĉinio	Finnlando
Britio	Mongolio
Slovakio	Nepalo
Brazilo	Pollando
Israelo	Nederlando
Ĉeĥio (inklude Moravio)	Japanio

Loĝlokoj de Legintoj kaj Legantoj de *Inter Ni*

Kanado	Kubo
Hungario	Rusio
Usono (Inkl. Virgulinaj Insuloj)	Niĝerlando
Germanio	Pollando
Rumanio (inkl. Transilvanio)	Aŭstralio
Britio	Togolando
Bulgario	Nederlando
Aŭstrio	Mongolio
Japanio	Nepalo
Slovakio	Koreio
Ĉeĥio	Slovenio
Brazilo	Kroatio
Francio	Danlando
Svislando	

SIGNOLINGVO EN NOV-ZELANDO

Nov-Zelando igas signolingvon unu el la oficialaj lingvoj de la lando

Signolingvo (= gestolingvo) estas oficiale agnoskita kiel la tria oficiala lingvo de Nov-Zelando kune kun la angla kaj la maoria. La nova leĝo donas al la publiko la rajton uzi signolingvon en tribunaloj, kaj ŝtataj departementoj devos provizi al la publiko servojn de signolingva interpretado.

Kvankam la eŭropunia parlamento aprobis du rezoluciojn, kiuj petis la agnoskon de naciaj signolingvoj fare de membro-ŝtatoj, nur kvar EU-landoj jam tion faris – Danio, Finnlando, Portugalio kaj Svedio. Tra la mondo, krom Nov-Zelando kaj la kvar EU-landoj, ankaŭ dek kvar aliaj landoj promulgis similajn leĝojn pri la uzado de signolingvo.

Ĉirkaŭ 1,6 milionoj da uzantoj de la 44 eŭropuniaj signolingvoj ne povas komuniki pro la malsameco de la lingvoj. Signolingvoj estas tre malsamaj ne nur en alilingvaj regionoj. Surduloj el Britio, Irlando kaj Usono, ekzemple, ne povas interkompreniĝi pro siaj malsamaj signolingvoj.

Entute estas nuntempe 114 signolingvoj en la mondo. Multaj surduloj ne havas la samajn rajtojn lerni kaj uzi siajn signolingvojn. En 2002, oni faris dokumentarion pri la komunikproblemoj de surduloj - „Silentaj Vortoj” traktas kun delikateco pri la temo, pere de intervjuoj kun surdaj homoj kaj ties familianoj.

Pro la manko de universala signolingvo, surduloj ofte uzas signojn de la Usona Signolingvo (USL). Tiuj signoj ofte estas konsiderataj kiel pli modaj. Kialo por la sukceso de USL estas ne nur la ekonomia kaj kultura povo de Usono, sed ankaŭ la ekzisto de Universitato ‚Gallaudet’ en Vaŝingtono (usona registarurbo). Tie USL estas la ĉefa instrulingvo, eĉ kiam estas granda procentaĵo da eksterlandaj studentoj. Nun la Eŭropa Unio konvinkas pli kaj pli da surduloj, ke tuteŭropa

signolingvo estus pli demokratia ol USL. Jam ekzistas „Internacia Signolingvo” sed, pro la manko de financado kaj oficiala rekono, mankas al ĝi formala gramatiko.

— de Ĝangalo-redakcio, laŭ la novzelanda korespondanto Majko Leon [Mike Leon]
<http://gxangalo.com/modules/news/article.php?storyid=2512>

(sendita de la Redakcio de Ĝangalo je 2006/4/12)

TESTU VIAN VORTSTOKON

Por ĉiu vorto, elektu la plej ĝustan difinon:

- | | |
|-----------|--|
| katario | a) ludejo por katoj
b) tropika oranĝkolora birdo
c) kontaktolineo ĉe elektraj fervojoj
ĉ) mentodora planto |
| pekli | a) meti iun manĝaĵon en salakvon por konservi
b) fari ion kontraŭ bona moralo aŭ religiaj reguloj
c) elmontri per kontrahado la muskolojn ĉe la brusto
ĉ) ŝteli ies verkon kaj ŝajnigi esti mem la aŭtoro |
| astrolabo | a) mezepoka sekstanto
b) osto ĉe la piedartiko
c) astronomia laboratorio
ĉ) ano de tibeta religia sekto |
| volframo | a) arkforma plafono
b) plumprovizita pilko, kiun oni ĵetas per rakedo
c) spiralforma ornamenaĵo sur kapo de arĉinstrumento
ĉ) blanka, varmimuna, metala elemento |
| siglo | a) antaŭlasta parto de la kojlo
b) agado de armeo, per ĉirkaŭigo de urbo
c) komeneliteroj per kiuj oni mallonge esprimas ion
ĉ) 18a grafemo de la greka alfabeto, responde al ‘s’ |
| glavo | a) vestpeco kiu kovras la manon
b) batalilo kun longa klingo
c) birdo kiu troviĝas ĉe la marbordo
ĉ) unuĉela fungo kiu estigas la alkoholan fermentadon |

BEDAŬRESPRIMO

Ege malfrue vi ricevas ĉi tiun numeron de *Inter Ni*, kaj pro tio nur la redaktoro ŝuldas. Refoje, mi multe pardonpetas pro tio.

Bob Williamson
via redaktoro